

Libro pri la infanaĝo de la Savinto

El la Latina tradukita de Gerrit Isai Berveling 2020

Fonto, el kiu estas tradukita:

paĝoj 366-372 de:

LOS EVANGELIOS APÓCRIFOS

Colección de textos griegos y latinos

versión crítica

estudios introductorios, comentarios e ilustraciones por Aurelio de

Santos Otero

segunda edición

Madrid – MCMLXIII

Interrete:

La originala Latina teksto:

ne trovita

Lastfoje kontrolitaj: 2020-05-16.

Libro pri la infanaĝo de la Savinto

LIBER DE INFANTIA SALVATORIS¹

1 Okazis en certa tempo, ke multaj infanoj ludante sekvis Jesuon, kiu ludis kun ili. Sed certa familiopatro, tre kolera, ĉar lia filo sekvis Jesuon, enŝlosis lin, por ke Jesuon li ne plu sekvu, en turo fortega kaj plej solida, kie neniu fenestaĉo videblis aŭ alia eniro, krom pordo kaj plej eta fenestro, kiu apenaŭ enlasis iom da lumo, kaj la pordo estis bone riglita. Okaze tiu familiopatro unu tagon renkontis Jesuon kun knaboj, kiuj ludis kun li. La enŝlosita knabo tion aŭdis kaj vokis al la fenestro: «Jesuo, plej bona amiko, vian voĉon mi aŭdis kaj mia animo aplaŭdis kaj mi sentas min pli bone. Kial vi forlasis min tie ĉi enŝlositan?» Jesuo sin turnis al li kaj respondis: «Elstreĉu al mi vian manon aŭ fingron tra aperturo». Kiam tion li faris, Jesuo ekprenis lian manon kaj tiris lin tra la plej streta fenestro, kaj la knabo lin sekvis. Kaj Jesuo diris al li: «Rekonu la forton de Dio kaj en via maljuno rakontu, kion al vi Dio faris en via infanaĝo». Kiam la familiopatro tion vidis, unue li iris al la pordo kaj konstatis, ke ĉio estas fermita kaj li ekkriis, ke okazis miraklo.

Sed liaj okuloj restis ŝlositaj tiel ke la potencon de Dio li ne rekonis.

¹ MANUSKRIPTO *Ms. lat. 11867 de la Bibl. Nat. de Paris.*

2 Tiu sama familiopatro, kiu estis plej alta inter la magistratoj de la sinagogo kaj la fariseoj kaj la skribistoj kaj la doktoroj, estis la sama Jozefo kiu plendis pri Jesuo, kiu faris miraklojn novajn inter la popolo, tiel ke li jam estis adorata kiel Dio; kaj ekzaltite li diris: «Jen Jesuon sekvas niaj infanoj, el kiuj unu estas mia filo, ĝis la kampo de Siĥar». Kaj kolere li ekkaptis branĉon por frapi Jesuon, kaj li sekvis Jesuon ĝis la monto, sub kiu kuŝis fekunda ebenaĵo kun faboj. Sed Jesuo forturnis lian koleron saltante de la supro de la monto ĝis loko je distanco de arkpafado. Kiam la ceteraj knaboj volis sekvi lin per simila salto, ili falis en abismon, kaj rompitis al si krurojn, brakojn kaj kolojn. Pro tio leviĝis forta protesto antaŭ Maria kaj Jozefo; sed Jesuo ĉiujn kuracis kaj faris ilin eĉ pli sanaj ol antaŭe.

Kiam tion li vidis, la ĉefo de la sinagogo, kiu ja estis la patro de la enkarcerigita knabo, kune kun ĉiuj, kiuj ĉeestis kaj tion vidis, ili ĉiuj adoris Dion Adonai. Sed la loko, en kiu Jesuo faris tiun salton, ĝis hodiaŭ nomiĝas la «Salto de l' Sinjoro».

3 Kiam fariĝis tempo por semi, Jozef ekiris semi tritikon kaj Jesuo lin sekvis. Sed kiam Jozef komencis semi, Jesuo levis la manon kaj kaptis el la tritiko kiom unupugne li povis teni, kaj ĵetis ĝin ĉe la fino de la kampo. Venis Jozef je la tempo de la rikolto, por rikolti sian rikolton. Venis ankaŭ Jesuo por tie kolekti la spikojn, kiujn li dismetis, kaj li kolektis cent mezurojn da plej bona frumento, kiom tri aŭ kvar aliaj kampoj ne estus donintaj. Kaj li diris al Jozef: «Voku al vi malriĉulojn, vidvinojn kaj orfojn, kaj disdonu la tritikon de mia semaĵo». Kaj tiel okazis.

Kaj denove ĉe la distribuado li ricevis la maksimumon kaj neatenditan gajnon, el kiu refreŝiĝis la malriĉuloj, kiuj tutkore benis la Sinjoron, dirante, ke sian popolon vizitis la Sinjoro, la Dio de Izrael.

4 Denove okazis en unu tago de la semado, kiam Jesuo iris tra Azio, kaj vidis iun kamparanon, kiu semis ian specon de legomo, kiun oni nomas pizo, sur la kampon, kiu estas konata kiel la kampo apud la tombo de Raĥel inter Jeruzalem kaj Betleĥem. Jesuo diris al li: «Homo, kion vi

semas?» Sed li, kolera kaj mokante, ke knabo de tia aĝo pri tio lin demandus, diris: «Ŝtonojn». Jesuo reagis: «Prave vi diras, ĉar estas ŝtonoj». Kaj tiuj grenoj ŝanĝiĝis en plej durajn ŝtonojn, retenante ĉiujn aspektojn de pizo, la koloron kaj eĉ la okuleton en la kapetoj, kiujn ĝis nun ili konservas. Kaj tiel per la nura parolo de Jesuo ĉiuj ĉi grenoj, kaj la semitaj kaj la semindaj, ŝanĝiĝis en ŝtonojn.

Kaj ĝis nun en tiu kampo la homoj, kiuj bone serĉas, trovas tiujn ŝtonojn.

5 Iun tagon frumatene, kiam la radiadon de la suno ankoraŭ mildigis la roso, Maria kaj Jozef de la regiono de Tiro kaj Sidono supreniris al Nazaret, kaj dum la suno leviĝis, Maria pli sufokiĝis kaj laca eksidis surgrunde. Ŝi diris al Jozef: «La temperaturo pli peziĝas, kion mi faru? Ombro ne estas, en kiu mi ŝirmiĝu». Kaj dum la manojn al la ĉielo ŝi levis, ŝi petis preĝe: «Ho virto de la Plejalta, laŭ la dolĉa vorto, kiun foje mi aŭdis sendita de Vi, ombrumu min²: vivu mia animo, kaj donu refreŝiĝon al mi». Sed kiam Jesuo tion aŭdis, li ĝojis pri ĉi diro, kaj sekan branĉon, kiun kvazaŭ bastonon li tenis en la mano, li fiksas en la teron kaj ordone li diris: «Tuj donu ombrojn plej agrablan al mia patrino». Kaj tuj tiu branĉo ekkreskis en arbon densan kaj branĉoplenan, kiu prezentis refreŝiĝon dolĉan por ĉiuj tie ripozantaj.

6 Unu vintran tagon, dum la suno plenforte radiis, unu suna radio pligrandiĝis kaj penetriĝis aliflanke en la fenestron de la domo de Jozef. Tie ĝi renkontis la knabetojn de la najbaraĵo, la amiketojn de Jesuo, diskuris tra la domo, kaj Jesuo eksidis sur la radio de la suno, kaj demetante siajn vestaĵojn, kvazaŭ sur plej forta bastono sidis tie. Kiam tion vidis liaj kunludantaj amiketoj, ili kredis kapabli fari la samon. Kaj ili suprengrimpis por sidi kun Jesuo, ludante laŭ lia ekzemplo. «³... ni frakasis». Sed Jesuo, dum instigis Maria kaj Jozef, kuracis la vundojn de

² Vidu Luko 1:35.

³ Supozeble mankas ekzemple: Sed ili falis planken kaj kriis:

ĉiuj, leĝere blovante super la ĉagrenan lokon, kaj diris: «La spirito blovas kie ĝi volas⁴, kaj sanigas kiujn ĝi volas», kaj ili saniĝis.

Kaj ĉion ĉi ili raportis al niaj patroj. Kaj en Jerusalemo tiu ĉi diro fariĝis konata kaj en la plej foraj lokoj de Juda. Kaj la famo pri Jesuo diskoniĝis tra la provincoj. Kaj oni venis por beni lin kaj por esti benata de li. Kaj ili diris al li: «Feliĉa la ventro, kiu portis vin, kaj la mamoj kiujn vi suĉis».⁵

Jozef kaj Maria dankis Dion en ĉio, kion ili aŭdis kaj vidis.

<...>⁶

12 Ĉe alia okazo Maria diris al sia filo: «Filo, iru al la fonto de Gabriel kaj tie ĉerpu akvon en amforo kaj portu tion al mi». Li obeis la patrinon, prenis la amforon kaj ekiris. Sekvis lin knaboj samaĝaj, kiuj tion vidis kaj ili same portis siajn amforojn. Post kiam Jesuo sian amforon plenigis per akvo, li reiris, sed li forte kunfrapiĝis kontraŭ ŝtonego, kiu kuŝis survoje, sed ĝi ne rompiĝis, nek troe bruis. Kiam tion vidis la ceteraj, ili faris same pri la siaj; ĉiu rompis sian amforon, kaj elfluis la akvo por kiu ili estis ekirintaj. Kiam pro tio estiĝis tumulto kaj plendado, Jesuo kunigis ĉiujn fragmentojn kaj riparis ĉiujn vazojn, kaj al ĉiu li redonis la propran vazon. Kaj rigardante ĉielen, li diris: «Patro, tiel same estu riparitaj la homoj dispelitaj, kiuj pereis».

Kaj ĉiujn ekregis mirego pro ĉi faro kaj ĉi diro, kaj ili eldiris benon: «Benita, kiu venas en la nomo de la Sinjoro. Amen».

⁴ Johano 3:8.

⁵ Luko 11:27.

⁶ En la teksto, kiun mi havas, mankas pluraj ĉapitroj.